
# FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bahn-Sozialwerk

BSW

Fondita 1952 Numero 2 aprilo / junio 1996



Per tia ĉarma etŝpura trajno ni veturos al la 40a jarkunveno en Alexisbad.
En la stacio Alexisbad ofte laŭplane renkontiĝas kelkaj trajnoj, alloga por la fotografemuloj.

## En lando de tulipoj kaj ventmuelejoj

Malgraŭ la ofte griza ĉielo kaj nekutima malvarmeco, la nederlanda ĉefurbo Den Haag ofertis bonajn antaŭkondiĉojn por la 48a kongreso de IFEF. En la centra stacidomo (kongresejo) kunvenis 295 fervojistoj kun siaj familianoj el 21 landoj. Inter la 11a kaj 18a de majo 1996 disvolviĝis alloga programo.

Inter la fervojfakaj laboroj elstaris la fakprelego, prezentita de LKK-estro J. Bultman. Li verve ilustris, ankaŭ per diapozitivoj, la historion de la trajntrafikregejo en Amsterdam. Raportis krome alilandaj prelegantoj pri trafikaj aktualaĵoj. Flanke de GEFA (40 partoprenantoj) prelegis prezidanto J. Gießner pri novaĵoj en la grandrapida eŭropa reto. Aliaj referaĵoj i. a. informis pri anstataŭigo de unutraka fervojponto el fero per dutraka arka betonponto (Svislando) kaj pri la fervoja tunelo sub Granda Belto (Danio). Ke Nederlandaj Fervojoj (NS) partoprenas ek de junio 1996 la grandrapidan pasaĝertrafikon, pruvis vizito al la nova trajntipo Talys. Kontrasto al tio estis la veturado per historia trajno okaze de la tuttaga ekskurso.

En la kunsidoj de la Faka Komisiono evidentiĝis multnombraj laboroj, i. a. lingva kontrolo de fakaj prelegoj kaj artikoloj, revizio de la Plena Ilustrita Vortaro koncerne fakterminojn kaj diskuto pri novaj terminoj, enkondukitaj de la Internacia Fervojunio (UIC). Krome oni prezentis la kvinan numeron de la Fervojfakaj Kajeroj.

Ne mirige, ke dum la solena malfermo O. Buller, direktoro de la Centra Oficejo de UEA, laŭdis la laboron de IFEF kiel faka aliĝinta asocio. Krome salutis esperantlingve la kongreson H. de Mooy (fervoja direkcio en Den Haag), d-ro Nelissen (nederlanda sekcio de FISAIC) kaj aliaj, krome reprezentantoj de 21 landaj asocioj.

En la plenkunsido, gvidita lerte de la IFEF-prezidanto, la plej multaj punktoj de la tagordo trovis la konsenton de la komitato. La strukturo de la landaj asocioj postulas, ke necesas fortaj klopodoj por gajni novajn, precipe junajn membrojn. La komitato akceptis la inviton por la venonta kongreso (10. - 17. 05. 1997) al Koŝice (Slovakio). En 1998 (16. - 22. 05.) la IFEF-kongreso estos en Danio kaj antaŭvideble en 1999 en Slovenio. GEFA-membro W. Barnickel estis nomumita honora IFEF-membro (vidu apartan informon).

Du vesperoj estis dediĉitaj al la kulturo. La kongresanaro povis ĝui blovmuzikon de precipe modernaj komponistoj. Ĉiuj membroj de tiu orkestro estis nederlandaj fervojistoj. Meritplenan aplaŭdon gajnis folklora grupo, kiu dum alia vespero gracie dancis - en lignaj ŝuoj. Ankaŭ ili estis fervojistoj samkiel la ĥoro el Alkmaar, kiu ĝojigis la aŭskultantojn per esperantlingvaj kantoj.

Neniu kongreso sen ekskursoj. La unua kondukis al Keukenhof, grandioza parko kun milmiloj da tulipoj kaj narcisoj en belege aranĝitaj florbedoj. Inter la multkoloraj tulipoj videblis ankaŭ tiaj kun la nomo Esperanto. Tiun posttagmezon eĉ akompanis printempa sunbrilo.

La sekvan matenon la ekskursantoj atingis la celon Enkhuizen per

aŭtobusoj, historia trajno, tirita de germandevena vaporlokomotivo kaj boato. Kia plezuro, manĝi en la ŝipo tipe nederlandan manĝaĵon, dum ekstere la vento blovis tra la Zuiderlago. Poste oni promenis tra subĉiela marmuzeo. Rekonstruitaj domoj de fiŝkaptistoj kaj metiistoj konigis la ofte mizeran vivon antaŭ jardekoj.
Multo estus ankoraŭ menciinda, ekzemple la bone funkcianta librovendejo, la bonvenaj kongresaj bultenoj, la vizito al la centro de UEA en Rotterdam. Ni ĝuis la etoson de granda familio, kaj ni dankas kore por neforgeseblaj tagoj en la lando de tulipoj kaj ventmuelejoj. Vendredon vespere la IFEF-prezidanto, en ĉeesto de la FISAIC-prezidanto Schmit, fermis la kongreson. Slovakio atendos nin en majo 1997.

W.B.



## Du honorigoj

### Willi Barnickel Honora Membro de IFEF

En la 48a IFK Den Haag laŭ unuanima decido de la estraro kaj komitato IFEF nomumis nian membron Willi Barnickel Honora membro. Ni tutkore gratulas al li pro tiu distingo, kiun li plene meritas.



### Ora Medalo de FISAIC al Henning Hauge

En la sama IFK la kasisto de IFEF, Henning Hauge, ricevis la oran medalon de FISAIC. GEFA sincere gratulas.



*fotogr. Gleßner*

## Denove pri la 40a jubilea jarkunveno

Eble konvenas, iom kompletigi la gvidartikolon en n-ro 1/96 el historia vidpunkto. Fakte GEFA, fondita en 1910 en Elberfeld kiel tutgermana asocio, ĉi-jare atingas aĝon de 86 jaroj. Ja ludas rolon, ke du militoj kaj la eventoj de la Tria Regno interrompis la faktan ekzistadon, sed vivantaj membroj ĉiam sukcesis "subtere" savi la organizon, ĝis denove eblis vivigi ĝin.

Tute alian rolon tamen ludis la tempo de 1945 ĝis 1989. Dum tiuj jaroj la fervojistoj de la Germana Federacia Fervojo DB senĝene povis organizi la asocion en la kadro de la Fervoja Sociala Servo BSW. Nur ekde la 70aj jaroj oni devis konstati pli kaj pli negativan influon de la ĝenerale malpliboniĝanta ekonomia stato de la fervojo. Tamen ĝis nuntempe - kaj malgraŭ la privatigo - BSW faras sian eblan por subteni la kulturan agadon de la fervojistoj. Kaj tiamaniere eblis per ĉiujara persona engaĝado de bonvolaj laboremaj membroj regule aranĝi jarajn kunvenojn ekde la jaro 1957 kun ofte konsiderinda nombro de eksterlandaj gastoj.

Alian evoluon devis travivi kaj trastari la kolegoj de la Germana Regna Fervojo DR. Ĝis 1965, kiam la esperantistoj en GDR denove rajtis montri sin en la kadro de la Germana Kulturligo, kelkaj "restantaj" kolegoj tamen estis "malkovritaj". Tio ĉefe okazis per hazardaj personaj renkontiĝoj dum vojaĝoj de kol. Giessner al lia hejmurbo Dresden. Helpe de tio ni tiam en la 50aj kaj 60aj jaroj neoficiale membrigis 12 DR-kolegojn en GEFA, pagis por ili kotizon al IFEF kaj dum la tuta tempo provizis ilin per nia Bulteno kaj per Internacia Fervojisto. Tio okazis pere de kol. Kinzel en Delitzsch. Kiam subite la revuoj ne plu alvenis ĉe li, ni trovis etan ĉirkaŭvojon pere de niaj hungaraj kolegoj, kiuj volonte helpis, tiel ke la revuoj denove alvenis.

Post 1965 la DR-kolegoj organizis kadre de la Germana Kulturligo sian propran vivon kaj fondis la "Fakgrupo de Esperantistoj fervojistaj de DR". Sekvis jaraj renkontiĝoj, kiuj same altiris gastojn el aliaj landoj, ĉefe kompreneble el la orientaj fervojoj. Sed ankaŭ la GEFA-prezidanto kelkfoje kaj tre volonte "ensteliĝis" en tiaj kunvenoj kaj ĉiam konstatis, ke la kolegoj de la alia germana fervojo tre pozitive agadis. Ekzemple ili aranĝis fervojfakajn prelegetojn pri antaŭe fiksitaj temoj. Ili ankaŭ partoprenis en similaj kunvenoj en aliaj orientaj landoj kaj en IFEF-kongresoj, kie do povis renkontiĝi "ambaŭ flankoj".

Ni fine denove substrekas nian ĝojon, ke post la eventoj de 1989 fine eblis denove kunigi ĉiujn germanajn fervojistojn esperantistajn en unu organizo kaj ĉi-jare en jubilea jarkunveno.

## Al niaj eksterlandaj legantoj

Jen ni denove informas, ke nia ĉi-jara jarkunveno okazos de la 4a ĝis 6a de oktobro en Alexisbad (Aleksisbad) en montaro Harz. Ĉiu estos kore bonvena. Ni ne aparte forsendos invitilojn. Vidu la artikolon "Kiel atingi Alexisbad".

# Kiel atingi Alexisbad

Alexisbad estas fervoje atingebla. Kiu konvene povas veturi al Magdeburg, faru tion kaj de Magdeburg prenu aŭ trajnon al direkto (Halberstadt) - Thale kaj veturu ĝis Quedlinburg aŭ prenu trajnon rekte al Halberstadt, ŝanĝu tie kaj veturu ankaŭ al Quedlinburg (takttrafiko). De Quedlinburg takttrafiko al Gernrode (9 km).

Kiu pli konvene povas atingi Leipzig /Halle, veturu de Halle al Aschersleben resp. Frose (stacio post Aschersleben) kaj tie ŝanĝu rekte al Gernrode.

De Gernrode oni prenos la etŝpuran fervojon al Alexisbad (15 km). Tio estas privata fervojo (Harzer Schmalspurbahnen). Liberaj biletoj validas sub certaj kondiĉoj, kiujn ni publikigos en n-ro 3/96 kun la tiam validaj horaroj. Vendredon vespere ni veturigos specialan aŭtobuson de Gernrode al Alexisbad por tiuj partoprenantoj, kiuj nur vespere povos alveni. Bonvolu noti en la aliĝilo vian alventempon en Gernrode. Dimanĉon, 6an de oktobro post la tagmanĝo ni veturigos specialan aŭtobuson al Quedlinburg, de kie oni atingos trajnojn al ĉiuj direktoj.

Unser Tagungsort liegt an der schönen Selketalbahn, eine der dampfbetriebenen Schmalspurbahnen im Harz. Das war für uns Anlaß, im Rahmen der Matinee Kurzvorträge zum Thema: "Interessante Schmalspurstrecken aufzunehmen.

Es werden hiermit alle Teilnehmer aufgerufen, sich mit eigenen Beiträgen zu beteiligen. Die Vorträge sollten durch Lichtbilder, Videoaufnahmen oder andere Illustrationen ergänzt werden.

Für die Sicherung der organisatorischen und technischen Vorbereitung wird darum gebeten, daß die Interessenten ihren Beitrag beim Vorstand mit folgenden Angaben anmelden:

- Thema
- Dauer des Vortrags (max 15 min.)
- Art und Format des Begleitmaterials (z.B. Dias 5x5)

Senden Sie bitte Ihre Mitteilung bis 31. August 1996 an das Mitglied des Arbeitsausschusses für Komunikiloj, diversaĵoj. Die Adresse entnehmen Sie bitte FE 1/95. GEFA

---

# Aus den Gruppen

**Schwelm**

Bedaŭrinde nur en aprilo 1996 nin atingis enhavoriĉa raporto pri aktivecoj en Schwelm dum 1995. Kvankam ne plu aktualaj, ni telegramstile mencias kelkajn faktojn el tiu raporto por montri, kiamaniere eblas vivigi Esperanton. Krome aperis kelkaj artikoloj en la loka gazetaro. I. a. okazis:

- regulaj renkontiĝoj en Schwelm,
- vizito de Zamenhoffesto en Duisburg,
- du sinjorinoj el Ĉinio dum ses semajnoj estis gastoj de Heinz Schindler, kiu kun ili vizitis UK Tampere, Saksion kaj Berlin.
- vizito en Metz kaj reciproka vizito el Metz kun festado de la 75a naskiĝtago de Schindler.

Menciinde estas, ke la grupmembro Kronshage povis havigi al si la notojn de Esperanto-marŝo komponita antaŭ pli ol 60 jaroj en Rothenburg (Lausitz) (nun pola).

**Frankfurt**

"Sprechen Sie Engleutsch"? Dies war das Thema eines Vortrags, den Egon Kiefer am 4. Januar 1996 vor der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main hielt. Er stützte sich dabei auf das vor einem Jahr erschienene gleichnamige Buch von Rudolf Lubeley (siehe ESPERANTO aktuell 1/95). Darin wendet sich der Verfasser gegen die Unkultur, den Deutschen durch eine Invasion von Anglizismen die sprachliche Identität zu rauben. Kiefer zeigte an Beispielen, daß leider auch die Deutsche Bahn immer mehr angloamerikanische Sprachgewohnheiten übernommen hat. Die lebhafte Auseinandersetzung über dieses auch für Esperanto wichtige Thema wurde an einem weiteren Abend (6. März) fortgeführt. Einerseits wurde die Forderung laut, die Deutschen sollten den Franzosen folgen und ihre Sprache gegen die geschäftlichen Interessen bestimmter Konzerne und Medien verteidigen. Andererseits sah man in dem Vordringen englischer Bezeichnungen eine Entwicklung, die sich nicht aufhalten lasse, auch nicht durch die im Buch vorgeschlagene Gründung einer deutschen Sprachgemeinschaft. Esperanto müsse alles daransetzen, von dieser Entwicklung nicht überrollt zu werden. W. Barnicke

**Ni funebras**

Forlasis nin por ĉiam Richard Wluka, (distrikto Hannover), la 19an de februaro 1996, unu el niaj plej malnovaj membroj.
Li ripozu en paco.

## GEFA-Veteranen in Bremen

Auch in diesem Frühling folgten der Einladung zu einem Treffen über 30 Mitglieder und Angehörige der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bahn-Sozialwerk (GEFA). Sie wurden am 11. April 1996 im Intercity-Restaurant des Hauptbahnhofs Bremen vom Beauftragten R. Terjung herzlich begrüßt. D. Hartig, der in Bremen geboren und in der Nähe des Hafens aufgewachsen ist, erzählte den aufmerksamen Zuhörern von der wechselvollen Geschichte und den Besonderheiten der Hansestadt. GEFA-Vorsitzender J. Gießner betonte, diese Treffen seien für ältere Sprachfreunde besonders wichtig, da manche nicht mehr an mehrtägigen Tagungen teilnehmen könnten. Er dankte Rolf Terjung und Dieter Hartig für die Vorbereitung und Durchführung dieser Zusammenkunft und dem BSW-Hauptvorstand, dessen Unterstützung es möglich mache, für die Senioren ein so erfreuliches Treffen alter Freunde zu veranstalten.

Nach gemeinsamem Mittagessen begab man sich unter Führung von D. Hartig in das reizvolle Schnoorviertel mit seinen verwinkelten Gassen und mittelalterlichen Handwerkerhäusern. Auch die bekannte Böttcherstraße, eine 1931

erbaute Laden- und Museumsgasse, wurde trotz kühlem Regenwetter besucht. Noch einmal trafen sich die Teilnehmer bei Kaffee und Kuchen, ehe sie sich auf den Heimweg begaben.

Allen, die das angenehme Zusammensein möglich gemacht haben, sei herzlich gedankt. Wir wollen uns in einem Jahr wiedersehen.

W.B.

## Das geht uns alle an

Das Leben in unserer Vereinigung stagniert. Nur wenige Gruppen kommen regelmäßig zusammen oder stellen wenigstens dann und wann etwas auf die Beine. Das kulturelle Leben beschränkt sich hauptsächlich auf die Teilnahme an den Jahresversammlungen und IFEF-Kongressen. Dazu kommt einerseits, daß die Überalterung zu einem dauernden Mitgliederschwund führt und andererseits die bekannte Situation es fast unmöglich macht, neue Mitglieder zu gewinnen. Deshalb ergeht an alle Mitglieder die dringende Bitte, mit aller Kraft zur Gesundung der Vereinigung beizutragen.

Hierunter geben wir einige Hilfen bekannt, die sich jeder zu Nutze machen kann:

**Werbung durch Information**

Bei allen, **wirklich allen** Gelegenheiten, informieren in Form von Flugblättern und Werbeschriften, z. B. auf Reisen, im Urlaub, kurz überall, wo man mit anderen Menschen zusammenkommt. Infos kann man z. B. in Warteräumen "liegen lassen". Bei den Bezirksbeauftragten ist Informationsmaterial vorrätig. Sehr wichtig: Nicht gewaltsam überreden wollen, nicht beschönigen, sondern wahrheitsgemäß informieren. Besonders wirksam ist erfahrungsgemäß die praktische Demonstration, also eine Unterhaltung zwischen Esperantisten.

**Ausstellungen**

Gruppen sollten Ausstellungen organisieren. Das läßt ich schon mit wenigen Mitteln machen. Anlaß dafür können Streckenjubiläen der Eisenbahn oder andere örtliche Veranstaltungen sein. Dabei wäre ein Info-Stand einzurichten.

Karin Lencki kaj C.M.J. Borremans, Niedersachsenweg 9B, 21244 Buchholz, Tel. 04187/475 helfen gern mit Prospekten.

**Kurse**

Viel mehr als bisher sollten Anstrengungen unternommen werden, eigene Kurse zu veranstalten oder sich an Kursen anderer Organisationen zu beteiligen. Die Werbung für den Esperanto-Fernkursus muß verstärkt werden (Bestell-Bedingungen s. FE 3/94. Auskunft gibt Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8, 67063 Ludwigshafen, Tel. 0621 510782). Durch Kurse neu gewonnene Mitglieder müssen unbedingt betreut werden.

**Kontakte zur örtlichen Presse**

Solche Kontakte sind besonders wichtig und wertvoll, denn Veröffentlichungen bedeuten gleichzeitig Information und Werbung. Aber bitte beachten: die Redakteure sind eher bereit, einen Artikel zu übernehmen, wenn er einen Bezug auf ein örtliches Ereignis oder Person

enthält, einen sogenannten örtlichen Aufhänger.

**Werbe-Info / Werbe-Broschüre**

Bei den Werbe-Bemühungen sind die sechs Werbe-Info-Hefte, die an alle Bba verteilt worden sind, recht nützlich. Dort sind viele Ratschläge und Vorschläge, neben Anregungen für gezieltes Werben nachzulesen.

Werbe-Infos, besonders unsere Werbe-Broschüre "Esperanto. Alle warten auf Europa. Wir sind schon da", stehen zur Verfügung.

Anfordern bei Dieter Hartig, Kasseler Str. 76, 28215 Bremen. Tel. 0421 35 33 39 Fax: 0421 358432. EDS: GA 28195 Bremen.

GEFA

## Helpu al la Hungaroj!

Radio Budapest ĉesis siajn Esperanto-sendaĵojn. Bonvolu ĝentile skribe peti la hungaran ambasadejon en Bonn, ke oni reprenu tiun decidon. Adreso: Botschaft der Ungarischen Republik, Turmstr. 30, 53175 Bonn.

## Achtung! IFEF-Kongreß 1997

Der 49. IFK findet vom 10. bis 17. 05. 1997 in Košice in der Ostslovakei statt, anschließend Nachkongreß in der Hohen Tatra vom 18. bis 23. 05. Bitte "Internacia Fervojisto" beachten. Teilnahme sehr empfehlenswert. Beiträge und Zahlungen werden wieder durch GEFA gesammelt. Informationen folgen.

## Antaŭanonco de la 38a IFEF-skisemajno

Ĝi okazos denove en Mühlbach (Aŭstrio) en sama Hotelo de la 8a ĝis la 15a de marto 1997. Idilia taŭga loko, skilifto apud la hotelo. La gemastroj, ges-oj Bürgler estas elstare ĝentilaj. Interesato priatentu la respektivajn publikiĝaĵojn en "Internacia Fervojisto".

## Berichtigungen zum Verzeichnis der Mitarbeiter in FE 1/96

Halle streichen: "Bf 06484 Ditfurt" und Basa-Nummer, Privattel. ist gleichzeitig Fax;

Hannover zusetzen: Tel. 0421 48 13 39;

München ergänzen: EDS: BetrSt. 80335 München Hbf;

Nürnberg 2. Zeile streichen, zusetzen: Tel 09171 60479:

Stuttgart Basa 177 ersetzen durch 977.

Theurich neue Tel.- und Fax-Nr.: 030 534 7064

Anschriftenänderung: Elfriede Kruse, Ebenreutherstr. 25, 90428 Nürnberg Tel. 0911 5 46 06 80 oder 54 16 64

Redaktfino por n-ro 3/96 estos la 10. 08. 96
Herausgeber/eldonanto: Bahn- Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main.
Schriftleitung/redakcio: Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, 37412 Herzberg am Harz.
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Kleine Annenstr. 34 28199 Bremen. Druck/preso Dieter Hartig